

Usona Esperantisto № 2018:6 (nov-dec)

Anoncoj

Nun eblas reta aliĝo al UK-2019; Kandidatiĝu por komitato de UEA; CO remalfermiĝas en Majno; Konkurso por krei UEA-forumon; Venas Usona-Kanada Landa Kongreso en Bostono; Alvoko al Belartaj Konkursoj

Sirakusaj esperantistoj en kultura foiro

loke • Ken HYNSON

Esperantistoj de la Esperanto-Societo de Sirakuso partoprenis en Kultura Foiro.

Jarfina raporto de la prezidanto

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Dum mia ĉeesto en Esperanto, kiu jam progresis dum pli ol dudek rapidaj jaroj, mi neniam vidis la estraron tiel aktivan, kiel ĝi estas nun.

De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Timoteo RICE

laŭdoj • Charlotte BURTON

La movado bezonas ne nur laŭtajn voĉojn kaj novajn verkojn, sed ankaŭ afablajn korojn kaj pasiajn organizantojn. Timoteo RICE estas tia persono.

Turisma gvidlibro por Boise, Idaho

vojaĝe tra Usono • Anna BENNETT, Larry BENNETT

Traduko bazita de libro *Nine Walking Tours*, ĝisdatigita de Larry kaj Anna BENNETT.

Rakonto de Claude PIRON

leterkesto • Enrique ELLEMBERG

Je la fino de 2005 mi decidis ke mi povus kompili libron; Mi estis tre honorita, ke sinjoro Claude PIRON verkis rakonton nur por mi.

Multaj agrablaj memoroj

vojaĝe tra la mondo • Claude PIRON

Multon oni povas transdoni kaj ricevi en nur unu rigardo. Tamen, ĉu eblas riski sian vivon, aŭ almenaŭ sian liberecon, surbaze de simpla intuicio?

La ŝlosita ĉambro

enigmo-solvoj

La solvo de nia pasintnumera enigmo.

Murdo ĉe tendejo

enigmoj • Daĉjo RUTAN

“Antaŭ unu horo, kiam Frank kaj mi kuiris kafon, du viroj kun fusiloj eniris nian tendejon. Ni supozis, ke ili estas ĉasistoj, ĝis kiam ili celis nin per la fusiloj kaj postulis monon.”

Why we need a strong national association

el la arĥivo • Cathy SCHULZE

“Why should I join ELNA?” is a frequent question. I answer it thusly.



Anoncoj

Malfermiĝas reta aliĝo por UK-2019

La 104-a Universala Kongreso de Esperanto (20-27 de Julio, 2019) okazos en la progresema kaj naturamanta finnlanda urbo Lahtio (finne, *Lahti*).

Oficialaj informoj troviĝas en la oficiala retpaĝo de la LKK <<http://esperanto.fi/uk2019>>. Eblas ankaŭ sekvi novaĵojn en sociaj komunikiloj: Facebook <<https://facebook.com/Lahtio2019>>, YouTube <<https://bit.ly/2ztbR2n>>, Twitter <<https://twitter.com/lahtio2019>>, kaj Instagram <<https://instagram.com/uk2019lahtio>>.



La 104-a UK nun akceptas retajn aliĝojn <https://uea.org/alighoj/uk_alighilo>. Bonvolu atenti, kaj atentigi viajn konatojn: la plej favoreza aliĝperiodo <https://uea.org/alighoj/uk_kotiztabelo> daŭros ĝis la 31-a de Decembro. Plej multe ŝparas la individuaj membroj de UEA kaj TEJO, ĉu bazaj aŭ abonantoj. Do nepre (re)aliĝu <<https://uea.org/alighoj/alighilo2019>>.

Kandidatiĝu por komitato de UEA

En 2019 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2019-2022. Parto de ĝi estos elekto de komitatoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatanon B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos kvin komitatanojn B.



La Ĝenerala Regularo (art. 8) difinas:

Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unu solan kandidaton el

inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn.

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA (*Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando*) ĝis la 28-a de Februaro 2019. Proponoj devas esti subskribitaj, do eblas uzi poŝton, fakson: +31 10 436 1751 aŭ sendo de elektronike subskribita dokumento al la retpoŝtadreso bkomitatanoj2019@co.uea.org

Por faciligi la kolekton de subtensubskriboj, haveblas formularo ĉe UEA.org <https://uea.org/1/teko/komitataj/Kandidatigilo_Komitatanoj_B_2019_2022.pdf>. La uzo de formularo ne estas deviga. Eblas subteni per iu ajn subskribita dokumento.


Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum la du antaŭaj jaroj (t.e. 2017 kaj 2018) kaj, se elektita, resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun komitatkunsidon en la periodo 2013-2018, ne estas reelektebla.

Se ne estos pli ol kvin kandidatoj, ili ĉiuj estos elektitaj sen voĉdonado. Se la nombro estos pli granda, la individuaj membroj elektos kvin komitatanojn B per poŝta balotado.

— *Martin SCHÄFFER, Ĝenerala Direktoro de UEA*

Centra Oficejo nun en nova loko

En la mezo de Novembro, mi fermis la oficejon en Kalifornio kaj portis amason de oficaĵoj al Portlando, en la ŝtato Majno. Mi deziras danki al kelkaj homoj, kiuj proponis sin por helpi min, kaj speciale al Trio kaj Sandy THACKER, kiuj forportis multajn aĵojn.



Dum la lastaj tagoj, mi ekipis la novan oficejon, kaj

nun mi pretas vendi librojn, membrecojn, revuojn, pinglojn, poŝtkartojn kaj similajn aferojn. Mi baldaŭ vendos librojn kontraŭ specialan rabaton.

Se vi deziras donaci brokantajn librojn (Mi revendos ilin en la retbutiko kontraŭ malgranda sumo), bonvolu kontakti min. La telefon-numero (510-653-0998) kaj la retadreso (eusa@esperanto-usa.org) ne ŝanĝiĝis.

La nova adreso por la oficejo estas:

Esperanto-USA
91-J Auburn St #1248
Portland ME 04103

— Vilĉjo HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo

Konkurso por krei novan kunlaborejon de UEA

La Estraro de UEA kreas novan forumon. Ĝi estos oficiala kunlaborejo de UEA, kie esperantistoj povos aktivi proksime de la Estraro. Ĝi havos plurajn rubrikojn kaj subrubrikojn, organizitajn laŭteme, kie laborgrupoj diskutos ideojn, kaj kie tiuj ideoj konserviĝos laŭ organizita kaj facile retrovebla maniero.



La forumo havu strukturon similan al la nuna UEA-forumo <<http://forumo.esperanto.net>> kun la jenaj trajtoj:

- Ĝi permesu legadon sen aliĝo, sed ĝi postulu aliĝon por skribado.
- Ĝi ebligu krei plurajn kategoriojn de forumanoj, kiuj havos aliron al specialaj partoj de la forumo.
- Ĝi ebligu taksadon de komentoj fare de la membroj.
- Ĝi donu poentojn aŭ stelojn al membroj laŭ pozitiva taksado de legantoj.
- Dezirindas, ke bonaj komentoj pli supre montriĝu en la fadenoj.
- Ĉiuj registritaj forumanoj rajtu komenti afiŝojn, sed nur forumanoj kun iu minimuma poentaro rajtu krei novajn afiŝojn.

- Nur membroj de UEA kun alta poentaro rajtu krei novajn rubrikojn kaj administri kategoriojn aŭ rubrikojn.
- Estu facile aranĝi tekston, kiel en la dokumentoredaktilo *Word*.
- Estu facile aldoni bildojn per kopio kaj algluado, aŭ per alŝuto al la forumo, sen la neceso de alŝuto al ekstera retejo.
- Ĝi ebligu al administranto la sendadon de avertoj kaj specialaj komunikoj al la forumanoj per retmesaĝo.
- Ĝi ebligu la abonon de fadenoj (por ricevi retpoŝte novajn komentojn).
- Estu robot-kontrolo (“CAPTCHA”), por certigi, ke abonas nur homoj.

Se vi fakas pri retejo-kreado, prezentu vian proponon kaj enspezo-deziron por la kreado de tiu forumo kaj monatan enspezon por zorgi pri la retejo dum unu jaro (per kontrakto renovigebla por pliaj periodoj).

Se vi ne estas komputilisto, sed volas uzi tiun kunlaborejon, prezentu viajn ideojn pri la dezirataj rimedoj de la forumo.

La limdato por prezenti proponon estas la 10-a de Januaro 2019. Por kandidatiĝi, bonvolu sendi bazan grafikan ideon kaj planon pri la strukturo de la retejo.

Por pliaj informoj, se vi havas demandojn, aŭ por sendi vian proponon, skribu al cid.emilio@gmail.com.

Venos Landa Kongreso en Bostono

Ni ĝojas anonci, ke la 67-a Usona Landa Kongreso okazos en la urbocentro de Bostono, Masaĉuseco, de la vespero de vendredo, 14 Junio, ĝis la tagmezo de lundo, 17 Junio 2019. La kongreso estos dulanda komuna kongreso de Esperanto-USA kaj la Kanada Esperanto-Asocio (KEA). Programeroj okazos por kaj komencantoj kaj spertaj parolantoj. Ni aparte celas aldoni interagajn programerojn. La kongrestemo estas *Agado kaj Kreado*.



Registrado komenciĝos en Januaro. Vizitu nian

retpaĝaron <<https://landakongreso.org>> por pli da informo pri la kongreso. Ni daŭre ĝisdatigos la paĝaron per novaj detaloj pri la programeroj.

Ĉu vi volas kontribui al la programo? Ni serĉas prelegantojn kaj gvidantojn de kreemaj kaj aktivaj programeroj. Se vi interesiĝas, sendu retmesaĝon al bostono2019@gmail.com.

— *MARCUS GRIEP, Chris PACEJO, Janjo PACEJO, Andreo ROSENBAUM, Julinjo SCHWARTZ & Benson SMITH, Loka Kongresa Komitato en Bostono*

Alvoko al Belartaj Konkursoj

La konkursoj okazas ekde 1950 sub aŭspicio de UEA, kun la celo evoluigi la artojn en kaj pere de la internacia lingvo.



La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de Marto 2019, kaj la rezultojn oni anoncos kadre de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio, Finnlando. Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK.

Konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo *Infanlibro de la Jaro*. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

- **Poezio:** maksimuma longo ne fiksita.
- **Prozo:** maksimuma longo 200 x 65 signoj (kvin paĝoj).

- **Prozo, subbranĉo mikronoveloj:** (maksimuma longo 100 vortoj). Aljuĝata estas nur unu premio.
- **Teatraĵoj:** maksimuma longo ne fiksita.
- **Teatraĵoj, subbranĉo monologoj (unupersonaj teatraĵoj) kaj skeĉoj (unu- aŭ divers-personaj):** daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. Aljuĝata estas nur unu premio.
- **Eseo:** teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 signoj (dek paĝoj).
- **Infanlibro de la Jaro:** originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2018. Aljuĝata estas nur unu premio.

Oni sendu po unu tajpita ekzemplero de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo *Infanlibro* – al *Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Miguel Gutiérrez Adúriz*, prefere retpoŝte al la adreso sciosfero@gmail.com; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coteros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanujo*, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo *Infanlibro* oni sendu po unu ekzemplero de la koncerna libro al la adreso de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj po tri ekzempleroj al *Ionel Oneț, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*.

Premioj: en la branĉoj *Poezio, Prozo, Teatraĵoj* kaj *Eseo*: unua premio, 260 €, dua premio, 182 €, tria premio, 104 €; *Nova Talento*, 182 €. En la branĉo *Infanlibro de la Jaro*, 546 €. En la du subbranĉoj *Mikronoveloj* kaj *Monologoj kaj skeĉoj*, po 125 €.

Sirakusaj esperantistoj en kultura foiro

loke • Ken HYNSON



Foto danke al Timothy BORONCZYK.

Esperantistoj de la Esperanto-Societo de Sirakuso partoprenis en la Kultura Foiro de strato Westcott la 23-an de Septembro. La foiro estas 27-jara tradicio en Sirakuso kiu festas diversecon de loka kvartalo. Laŭtakse iom pli ol 11 000 homoj venis kaj 120

organizoj starigis inform-budojn. Oni ĝuis arton, muzikon, dancadon, kaj bongustajn manĝaĵojn.

Ni starigis propran budon kaj ornamis ĝin per Esperanta flago kaj verdaj kaj blankaj paperaj floroj. Sur nia tablo ni havis broŝurojn pri Esperanto, ekzemplerojn de Esperantaj libroj kaj ludoj, kaj grandan bovlon kun verdaj kaj blankaj dolĉaĵoj. Dum la evento ni parolis pri Esperanto kaj disdonis informojn al multaj homoj. Surprizis nin, kiom da homoj jam aŭdis pri Esperanto. Fakte, la unua vizitanto al nia tendo salutis nin Esperante, dirante “Saluton!”

La foiro estis la unua komunuma evento en kiu ni partoprenis, kaj ni konsideras tiun partoprenon kiel sukceson. Espereble ni semis verdajn semojn. Kelkaj homoj volonte donis al ni sian retroŝtadreson kaj ni sendos al ili mesaĝojn pri niaj renkontiĝoj.

Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere sendu materialojn retroŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Se vi sendas materialojn poŝte, ni resendos ilin al vi se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eu>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia repaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, your address, and a head shot. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. If you send materials by mail, we will return them to you if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike license BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we additionally ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.

De la estraro

En ĉiu numero de *UE* mi petas raportojn de la estraranoj pri lastatempaj agadoj. Mi bonvenigas viajn demandojn por ili, ĉu en Esperanto aŭ angle. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono. — *Red.*

Murray MERNER, Treasurer

Our new fiscal year (January thru December) will start in a couple of weeks as will our 2019 budget that was approved at the *Landa Kongreso* in July. The Board is conscious of its fiscal responsibility. In the past few years there has been some borrowing from our financial assets to pay for what EUSA does. That could not continue. Moving our Central Office to Portland, Maine and reducing the number of books in our *retbutiko* will reduce our costs considerably and put us on a stronger financial footing. EUSA will continue to serve our members and the Esperantists of the USA (and North America) and look for more opportunities to be of service.



— Murray MERNER

Charlotte BURTON, Direktoro

Mian tempon ĉi-monate okupis planado kaj prezentado de retseminario helpe de AAIE (Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto) kaj ESF (Esperantic Studies Foundation). La



retseminario okazis per Zoom la 4-an de Decembro kaj temis pri socia justeco kaj lingva edukado. La tuta afero estis registrita, kaj la filmo estos videbla ĉe YouTube.

Ni jam planas duan retseminaron pri la temo *Lernaj handikapoj kaj Esperanto*, kiu okazos en Februaro per Zoom. Serĉu la anoncojn ĉe nia retejo por pli da informo pli proksime al tiu tempo.

[*Noto de la redaktoro: nun videblas registraĵo de la decembra retseminario* <<https://youtu.be/3sTBjiqaWG8>>].

— Charlotte BURTON

Rakonto de Claude PIRON

leterkesto • Enrique ELLEMBERG

Mi ĵus legis la artikolon *Demandu al usona esperantisto* en numero 2018:5.

Unu respondo de Filipino konsilas ke ni ne “konvinku”, sed rakontu pri aferoj rilataj al Esperanto (en niaj vivoj).

Je la fino de 2005 mi decidis ke mi povus verki libron ... bone, ne verki, sed kompili. (Mi ne estas verkisto ... nek tradukisto)

Pro tio mi petis, ke oni sendu al mi rakontojn pri mirindaĵoj en siaj vivoj, kiuj ne okazus sen scio de Esperanto.



Bedaŭrinde, mi ne ricevis sufiĉe da rakontoj. Unu el la plej fruaj kontribuaj estis de konata esperantisto. Li ne konis min, sed li ŝatis la ideon, kaj pro tio li kontribuis belan rakonton.

Mi estis tre honorita, ke sinjoro Claude PIRON verkis rakonton nur por mi. Mi metis ĝin kaj kelkajn rakontojn en mian retejon <<http://esperantofre.com/book/>>. Poste kelkaj homoj kopiis la rakonton en aliajn retpaĝojn, sed mi konscias, ke la plejmulto da esperantistoj neniam legis ĝin. Pro tio mi sendas la artikolon al vi.

Mi multe dankas al Enrique pro la plusendo de la eseo. Ĝi montras la kutime ĉarmajn spriton, homamon, kaj humuron, kiuj karakterizas la verkojn de Piron. La eseo aperas ĉi-numere en aparta artikolo. —Red.

Jarfina raporto de la prezidanto

de la prezidanto • Filipino DORCAS

La estraro de Esperanto-USA estis kaj daŭre estas tre okupita pri la movado. Dum mia ĉeesto en Esperanto, kiu jam progresis dum pli ol dudek rapidaj jaroj, mi neniam vidis la estraron tiel aktivan, kiel ĝi estas nun.

NASK 2019: Ni helpas kaj kunlaboras kiel eble plej forte kun la organizantoj de NASK, la fama somera kursaro. Legu pli ĉe la NASK-retejo <http://nask.esperanto-usa.org/>. En 2019 ni festos la 50-jaran jubileon de NASK! Venu kaj ĝuu kun ni en Raleigh ĉe la “Universitato de Paco” (William Peace University). Ni ĝuos kvin nivelojn de kursoj kaj studos kun famaj kaj kapablaj instruistoj.

La Landa Kongreso en 2019 okazos en Bostono, kune kun niaj amikoj de la Kanada Esperanto-Asocio. Memoru, ke en 2018 ni havis cent partoprenantojn en Seatlo. Ni atendas pli ol tio en 2019. Nia retejo havos informon.

La UK en 2020 okazos en Montrealo. Ni kunlaboros forte kun la amikoj tie por kungastigi tiun grandegan kongreson. Tio okazos samtempe kaj samloke kun la landa kongreso de Esperanto-USA. Venu kun ni al Kanado en 2020! La informo haveblas en nia retejo kiam ĝi estos preta.

USEJ nun reaktiviĝas forte kaj grandskale. La gvidantoj de la junuloj planas eventojn por plani kaj starigi bonajn eventojn por la junuloj. Legu plu pri tio en la venontaj numeroj de *Usona Esperantisto*.

Ni kunlaboras multe kun ESF, la *Esperantic Studies Foundation* <https://www.esperantic.org>. La gvidantoj de ESF multmaniere subtenas projektojn de Esperanto-USA, kaj donas ideojn pri la pliboniĝo de la movado. Ni multe dankas al ESF pro ties bonkoraj agadoj al Esperanto-USA.

AAIE, la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, aktivis plu kaj nun frontas la defiojn pri kiel la lernado de Esperanto ŝanĝiĝas en la nuna teknologia mondo. Esperanto-USA funkcias en rilatoj kun AAIE.

Esperanto-USA estas membro de UEA <http://uea.org> kiel landa asocio. Ni havas pli ol

kvardek delegitojn de Usono al UEA. UEA estas la ĉefa organizo por tutmonda Esperanto. Ni rekomendas, ke vi lernu plu pri UEA, la celoj, kaj la agadoj.

La estraro daŭre kunsidas almenaŭ monate, sed ni ankaŭ estas en ĉiutaga kontakto per diversaj interretaj komunikiloj, kiel retmesaĝoj, *Slack*, kaj *Trello*.

Ni starigas informservojn per Reddit kaj retseminarioj per Zoom. Legu en nia retejo, *Usona Esperantisto*, kaj nia Facebook-paĝo <https://facebook.com/esperantousa>.

Pro tio, ke Esperanto-USA antaŭe perdis \$30,000 jare (pli malpli), en 2018 per la bonkora agado de la Direktoro de nia Centra Oficejo, Vilĉjo HARRIS, ni translokis la oficejon al Majno, kie Vilĉjo nun loĝas. Nia CO ne plu troviĝas en Kalifornio ĉar la lu-kosto de la oficejo estis ege malhelpema. La nova loko ŝparos al ni la kvanton da mono, kiun ni bezonis por stabiligi nian buĝeton.

Danke al nia nova kasisto, Murray MERNER, ni donas pli da atento al niaj raportoj kaj starigas novajn kontojn por vere montri nian nunan situacion; sekvas pli malfermaj raportoj al la membroj. Dankon al Murray pro lia maniero peti pli da informo kaj raportoj pli ofte al la estraro.

Niaj lokaj grupoj pli kaj pli uzas la novajn ilojn, kiujn ni rekomendis en la pasintaj numeroj de la bulteno. Niaj kluboj jam komencas interkomunikiĝi kun niaj novaj helpantoj por la regionoj pli ofte. Dankon al niaj regionaj kunordigantoj.

Se vi havas ideojn, demandojn, aŭ raportojn, nepre informu nin per telefono, poŝto, retpoŝto, Reddit, Twitter, Facebook, aŭ alia ilo. Ni estas pli kaj pli facile troveblaj kaj aŭskultemaj.

Ek kaj antaŭen!

Timoteo RICE

laŭdoj • Charlotte BURTON



La movado bezonas ne nur laŭtajn voĉojn kaj novajn verkojn, sed ankaŭ afablajn korojn kaj pasiajn organizantojn. Timoteo RICE estas tia persono, kaj mi ne diras tion nur pro tio, ke estis li, kiu instigis min eklerni Esperanton antaŭ iom da jaroj. Timoteo starigis lokan klubon de Esperanto en sia urbo, helpis traduki la faman verkon *La voko de Hˆtulho* de usona verkisto H. P. LOVECRAFT, esperantigis ludsistemon por surtablaj rolludoj, kaj nun estas Rajtprotektanto kaj estro de la Kandidatiga Komitato de Esperanto-USA.

Li vidis la mankon de lokaj kluboj en Oklahomo, do li trovis aliajn esperantistojn tie, kaj kune kreis klubon en sia urbo. Oni povas nun trovi ĝin en la retejo de Esperanto-USA. Li vidis la mankon de tradukoj de Lovecraft, do li ektradukis. Kiam li ne plu havis tempon traduki, li trovis helpanton por fini la laboron kun li. Kiam li ekvolis ludi sian plej ŝatatan surtablan rolludon kun samideanoj, li serĉis sistemon, kiun li mem rajtas traduki, kaj tion faris. Timoteo ne estas tia homo, kia atendas alian homon por fari iun bezonatan laboron. Li mem eklaboras.

Nun Timoteo havas du postenojn ĉe Esperanto-USA: Rajtprotektanto, kaj estro de la Kandidatiga Komitato. Kiel la rajtprotektanto, Timoteo estas via voĉo en la estraro de Esperanto-USA. Ĉu io ĝenas vin pri nia agado? Do kontaktu lin! Ĉu vi havas ideon pri io, kion ni povus fari por pli bone helpi la movadon ĉe via loko? Do diru al li! La rajtprotektanto aŭskultos vin kaj peros viajn sugestojn, ĝenojn, kaj ideojn al la ĝustaj homoj en la organizaĵo.

Kiel la estro de la kandidatiga komitato, Timoteo helpas kaj gvidos la komitaton dum ili serĉas kandidatojn por la venonta estrara elekto de Esperanto-USA. Ĉu vi konas iun, kiu volus kaj povus bone servi kun nia tre aktiva estraro? Ĉu vi mem volus esti kandidato? Do kontaktu lin kaj la komitaton por ekscii kiel vi povus servi kaj labori por la movado en Usono, kaj por lerni pri ĉio, kion niaj kandidatoj devas fari.

Oni povas kontakti Timoteon per retpoŝto ĉe ombudsman@esperanto-usa.org.

Turisma gvidlibro por Boise, Idaho

vojaĝe tra Usono • Anna BENNETT, Larry BENNETT

Larry kaj Anna BENNETT lastatempe reverkis kaj tradukis gvidlibron pri Malnova Boise, Idaho. Arlyn kaj Les KERR helpis kontroli la tekston kaj proponis kelkajn plibonigojn. Ĉi tie ni aperigas nur tri eltiraĵojn; la plenan libron oni rajtas elŝuti senpage en PDF-formo <<https://bit.ly/2QEh5hz>>.



Konstruaĵo Statesman

Konstruaĵo Statesman, 601 Strato Main (1910)

The Idaho Statesman, kiu komenciĝis kiel trifoje semajna ĵurnalo en 1864, uzis ĉi tiun trian lokon ĝis 1951. Poste uzis ĝin la *Usona Ruĝa Kruco*, poste privata klubo en la dua etaĝo kaj trinkejo en la kelo. Nun uzas ĝin la *Brickyard Steakhouse*.



Konstruaĵo Johnson

Konstruaĵo R. Z. Johnson, 515 Strato Idaho (1892)

Unue oni planis fari grupon de kvin urbodomoj en tiu ĉi dombloko, sed pro la Paniko de 1893, nur du estis konstruitaj. Ĉi tiu ĉarma konstruaĵo, kun ĝemelaj okangulaj turoj kaj arkaĵaj breĉoj estis referita por komerca uzo. La sama germane-naskita arkitekto desegnis la *Natatorium*, faman banejon kaj ludej-palacon, kiu staris ĉe la fino de Avenuo *Warm Springs* ĝis 1934.



Ŝtatodomo de Idaho

Ŝtatodomo de Idaho (1905-1912)

La Kapitolo ĉe la norda fino de Bulvardo *Capitol* imitas la stilon de la Kapitolo de Usono. La centra nov-klasika parto estis konstruita inter 1905 kaj 1912 kun aloj aldonitaj en 1919. Oni uzis sabloŝtonon de la ŝtonminejo ĉe *Table Rock* por konstrui ĝin.

Multaj agrablaj memoroj

vojaĝe tra la mondo • Claude PIRON

La jena eseo venas al ni danke al membro Enrique ELLEMBERG, kiu en 2005 petis kontribuojn por nova libro pri mirindaj spertoj de esperantistoj. (Vidu la ĉi-numeran leterkeston. Unu el la pli fruaj kontribuintoj estis la fama Claude PIRON, kiu verkis la jenan eseon. Bedaŭrinde, la libro ne plene realiĝis, sed Enrique afable dividas kun ni la kontribuon de Piron, por ke pli multaj homoj ekkonu ĝin.

Respondante en 2006 al la peto de Enrique, Piron skribis: “Mia Esperanto-vivo tiom riĉas je agrablaj memoroj, ke, kiam mi decidis jesi al via peto, mia menso eksimilis svarmon da impetaj geknaboj, kiuj interpuŝiĝis, ĉar ĉiu volis venki la aliajn en la konkuro por esti elektita. Fakte, unu sukcesis superi kaj elstari, kvankam miaopinie ĝi ne havas pli da meritoj ol la aliaj. Jen ĝi.”



Mi plujare laboris ĉe Monda Organizo pri Sano (MOS). Kiam mi forlasis la organizon por starigi privatan kabineton, ĝi tamen plu dungis min unu- aŭ dufoje jare por mallongaj deĵoroj, ĉar mi povis fari fidindan protokolon de diskuto pri sanproblemoj uzantaj kvar aŭ kvin lingvojn, inkluzive de la ĉina kaj rusa, kaj ne troveblis tiom da personoj kapablaj tion fari. Foje en la jaroj

1970-aj, ĝi demandis, ĉu mi konsentos vojaĝi al Alma-Ata (nun Almaty), en Kazaĥujo, por labori kadre de internacia konferenco diskutonta pri la organizo de bazaj sanservoj. Al mi ĉiam plaĉas malkovri novajn landojn, mi do plezure konsentis. Tuj antaŭ la konferenco mi laboris en alia misio en Filipinoj, kaj kiam mi atingis la Manilan flughavenon por aviadili al Kazaĥujo tra Delhio (Barato) kaj Taŝkento (Uzbekujo), surprizis min tie renkonti kvar ekskolegojn ankaŭ flugontajn ĝis Alma-Ata. Ni ĉiuj uzis la saman flugon el Delhio al Taŝkento. Tiutempe Uzbekujo kaj Kazaĥujo ankoraŭ estis partoj de Sovetunio.

Kiam mi devas vojaĝi, mi ĉiam ekrilatas kun lokaj Esperanto-parolantoj, ĉar tio estas bona rimedo ekkoni landon per persona kontakto. Mi do antaŭe skribis al la UEA-delegito en Taŝkento por informi lin pri mia alveno. Li respondis, ke li akceptos min en la flughaveno – tio estis pura afableco, ĉar delegitoj ne estas supozataj tiagrade ĝeni sin – kaj li petis, ke mi sendu foton por povi tuj rekoni min. Kiam nia grupeto atingis la alvenhalon, nur kvar personoj staris tie atende al alvenantoj. Du staris en la maldekstra angulo, du en la dekstra. La kontrasto inter iliaj vizaĝoj kaj sintenoj estis okulfrapaj. La du unuaj aperis deprimitaj, senĝojaj, superŝutitaj de zorgoj; la du aliaj plenaj je viglo kaj entuziasmo.

“Saluton!” La vorto laŭte reeĥis en la halo. Ĝi venis el la dekstra angulo. Ambaŭ viroj, kiuj tie staris, venis al mi preskaŭ kure kaj varme ĉirkaŭbrakis min, kvazaŭ ni estus amataj parencoj, kiuj ne vidis unu la alian dum du jardekoj aŭ eĉ pli. Miaj kolegoj miregis. Ili ne kapablis imagi, kiuj estas tiuj du viroj, ŝajne familianoj de kolego, kiu neniam diris, ke li konas iun ajn en Soveta Centra Azio, eĉ dum ni tien flugis. Estis des pli nekredeble, ĉar apud kvindekjarulo, kiu aspektis – krom la vestoj – kiel iu ajn eŭropa ordinarulo, staris uzbeko eble 25-jara, kun nigregaj haroj, oblikvaj okuloj kaj trajtoj klare orientaziaj. Li estis sciencisto kaj la prezidanto de la loka Esperanto-klubo; lia kunulo estis la UEA-delegito, ukraino laŭdevene.

Kiam nia triopo komencis babili en rapida Esperanto,

la du malgajuloj proksimiĝis al nia grupo. Ili klarigis, ke ili estas kuracistoj laborantaj por la Uzbekuja San-Ministrejo, kaj ke ili estis senditaj flughavenen por bonvenigi nin. Ili alparolis nin en iom mallerta angla lingvo elparolata laŭ ege rusa prononco.

“Ni iru manĝi, mi invitas vin, la tutan grupon!” diris la juna uzbeko – estis tempo vespermanĝi – sed kiam mi tradukis por miaj kolegoj, ili hezitis. “Ni malakceptu. Li ne konas nin, kial li invitu nin?” Kiam mi klarigis ilian malvolon, la juna prezidanto petis min diri, ke tio estas uzbeka gastamo, kaj li gvidis nin al najbara restoracio. Ni ĉiuj sekvis lin, ankaŭ la du doktoroj el la ministrejo, kiuj aspektis pli kaj pli malkomforte.

La manĝo estis plej plaĉa. Je mia fino de la tablo ni diskutis pri politiko kaj sociaj aferoj en flua Esperanto. Miaj kolegoj ne komprenis ĉion, sed ili rimarkis sufiĉe da internaciaj vortoj por scii, pri kio ni parolas. Ili diris al mi poste, ke ili ne povis kredi al siaj oreloj. En Sovetunio, diskuti tiajn temojn videble sen eĉ plej eta inhibo ... kiel tio eblis?

“Vi vere parolas tiun Esperanton!” diris kolego Mauri, survoje hotelen. Mauri kaj mi laboris en la sama unuo dum almenaŭ sep jaroj, kaj mi ofte emfazis la bonegajn kvalitojn de Esperanto, akcentante, kiel bone ĝi taŭgas por internacia komunikado. Ofte mi diris al li, ke la lingvo estas kaj facila kaj riĉa, ke mi havis neniun problemon por atingi bonan nivelon en ĝi, kaj ke mi parolas ĝin ofte, ĉar mi kunlaboras hejmlande kun Kultura Centro Esperantista. Pri mia scipovo li do devus scii. Sed antaŭ ol aŭdi min tiuvespere, li ne prenis serioze miajn dirojn. La diferenco inter mia ripetita atesto kaj lia bildo pri la lingvo – projekto, fora idealo, ŝatokupo sen praktika valoro – frapis min kiel io vere interesa. Ŝajnas, ke Esperanto, eĉ se priskribita surbaze de persona sperto, situas en la sfero de nekredindaj aŭ nekredeblaj rakontoj.

La lokaj aŭtoritatoj planis, ke la morgaŭon la MOS-grupo faros oficialan urboviziton kune kun la du malĝojaj doktoroj.

“Ne iru kun ili, ni vizitos la urbon private”, la juna sciencisto diris al mi post la vespermanĝo, kaj li efektive alvenis al nia hotelo la sekvantan matenon. Miaj kolegoj eniĝis en *Inturist*-minibuson, dum mi enaŭtiĝis en la veturilon, kiun la uzbeka esperantisto prunteprenis de sia oficejo. Dum kelkaj minutoj ni sekvis la turisman minibuson, sed baldaŭ ni elektis alian vojon. La juna uzbeko montris al mi aferojn – ekzemple aĉ-aspektajn kvartalojn kun fuŝkonstruitaj domaĉoj – kiujn la “oficiala” grupo neniam vidis. Foje ni pasis sur ponto, kaj mi demandis mian novan amikon, kiel nomiĝas la rivero, super kiu ni veturas. “Ne estas rivero”, li respondis. “Estas kanalo. Ĝin konstruis Ciro (Koreŝo) antaŭlonge, kiam ni ĝuis la feliĉon aparteni al Persujo.”

Bedaŭrinde, mi ne disponis multan tempon. Post kelkaj horoj mi devis esti ree en la flughaveno por trafi la Aeroflotan flugon al Alma-Ata. Tie mi alfrontis neatenditan problemon: kiel trovi en mia jam ĝisrande plenŝtopita sako lokon por la ampleksa akvomelono, kiun la juna uzbeko nepre volis, ke mi kunprenu, deklarinte, ke tiu estas la regiono kun la plej bonaj fruktoj el la tuta USSR. Mi esperas, ke li neniam legos ĉi tiun tekston, ĉar mi honte konfesas, ke, trovante neniun solvon al la problemo, mi lasis la akvomelonon sur benko en la flughaveno.

En la aviadilo mi konstante cerbumis pri lia fido. Ĉi tio estis Sovetunio, en tempo, kiam la komunisma reĝimo ĉasadis “malĝustajn opiniantojn” kun febra senkompato. Li ne povis scii, ĉu mi estas aŭ ne komunisto kapabla denunci lin. Ĉu li simple estis senzorgema facilanimulo, kies moto estus “mi fajfas pri ili”? Neverŝajne. Tiaj homoj ĝenerale estas supraĵaj, kio li tute certe ne estis. Dum ni diskutis, ni diskutis profunde, sentabue, kaj ni serioze pritraktis seriozajn temojn. Estas vere, ke je la unua sekundo, kiam ni renkontiĝis en la flughaveno, ni sentis spiritan komunecon. Multon oni povas transdoni kaj ricevi en nur unu rigardo. Tamen, ĉu eblas riski sian vivon, aŭ almenaŭ sian liberecon, surbaze de simpla intuicio? Eble pro lia fido al mi, ĉi tiu travivaĵo elstaras inter la multaj memoraĵoj.

La ŝlosita ĉambro

enigmo-solvoj

En nia pasintnumera enigmo, *La ŝlosita ĉambro*, ni legis pri truko ĉe la hejmo de Arĉjo KOLOFON, blinda violonisto. Arĉjo rakontis kiel lia amiko Rikardo RUZEFAR vetis, ke li povos eniri malluman, ŝlositan ĉambro por ŝanĝi la enhavon de glaso fermita en ŝlosita gardoŝranko. Ŝajne Rikardo sukcesis, kaj Arĉjo aŭdis nenion.



Kiel kutime, profesoro Elija ŜIBOLET tuj divenis la solvon. “Estas nenio misa pri viaj oreloj”, li diris, “ĉar neniu povus aŭdi ...” kion?

Ĉi-foje la plej frua solvo venis de nova detektivo Samuĉo CROSBY, kiu lerte trafis la trukon:

Neniu povus aŭdi ... la degeladon de glacio. Rikardo certe glaciigis kelkajn kubojn de zingibra sodakvo antaŭ la vizito, kaj li metis tiujn kubojn en

la glason. Post sia degelado, tiuj kuboĵ fariĝis zingibra sodakvo, kiu jam estas la kutima trinkaĵo de Rikardo.

Jes ja. Rikardo kunportis la glacikuboĵn en speciala sako, kiu izolas sian enhavon kontraŭ varmo. Ĉe la verŝotablo, de kie li ŝajnis uzi glacikuboĵn de Arĉjo, faritajn el pura akvo, li anstataŭe prenis la sodakvajn glacikuboĵn el sia sako.

Alvenis ĝustaj solvoj de ankaŭ Ellen EDDY kaj Erik FELKER. Erik sagace aldonis:

Mi demandis al mi kial Kolofon ne flaris la zingibran aromon de la glacikuboĵ, sed Ruzefar, per sia antaŭtrinka elverŝado de la sodakvo, kaŭzis iom de zingibra aromo en la ĉambro. Tio estus konfuza por nevidanto, kiu probable dependus pli ol vidanto de sia flarado.

Gratulon al ĉiuj pro la sagacaj solvoj. **En la lotumado ĉi-foje gajnis Samuĉo.** Li ricevos \$5-rabaton de la retbutiko.

Murdo ĉe tendejo

enigmoj • Daĉjo RUTAN

Profesoro Elija ŜIBOLET kaj lia bona amiko, Ŝerifo Angus PRENMON estis tendumantaj en bela arbara loko ĉe la rando de Blulageto. Post malstreĉa tago de fiŝkaptado ili apenaŭ estis manĝintaj vespermanĝon kiam subite aperis Simono SINAPO en ilia tendejo.



“Venu tuj, Ŝerifo!” Simono kriis, anhelante. “Frank SAGISTO estas murdita!”

La du tuj ekstaris kaj donis akvon al la juna viro.

“Kio okazis?”, demandis Prenmon.

“Venu kun mi.” Sinapo viŝis sian buŝon. “Mi ... mi klarigos survoje.”

Dum la kvin-minuta marŝo al sia tendejo, Sinapo rakontis, kio okazis. “Antaŭ unu horo, kiam Frank kaj mi kuiris kafon, du viroj kun fusiloj eniris nian tendejon. Ni supozis, ke ili estas ĉasistoj, ĝis kiam ili celis nin per la fusiloj kaj postulis monon. Frank atakis unu viron, sed la alia batis lin per ŝtono. Ili ligis nin per ŝnuro kaj ŝtelis nian monon.

“Post iom da tempo mi finfine malligiĝis kaj tranĉis la ŝnurojn de Frank – li estis mortinta. Mi memoris, ke

ankaŭ vi tendumas hodiaŭ, Ŝerifo, do mi serĉis vian tendarfajron.”

Ĉe la tendejo de Sinapo, la lerta okulo de Ŝibolet maltrafis nenion. La korpo de Sagisto kuŝis surdorse apud la fajro. Proksime al la kadavro estis sangokovrita ŝtono kaj kelkaj pecoj de ŝnuro. Unu metron for estis pli longa, netranĉita ŝnurpeco – supozeble tiu, kiu antaŭe ligis Sinapon.

En la komforta tendo estis du dormosakoj kaj dorsosakoj. Sur larĝa, plata ŝtono estis du paroj da teleroj kaj la kutimaj manĝiloj. La tasoj estis puraj kaj neuzitaj.

Ŝibolet stariĝis kaj paŝis al Prenmon kaj Sinapo. “Frank Sagisto mortis antaŭ unu horo, verŝajne pro bato al la kapo”, diris la profesoro.

Dum momenta paŭzo, la solaj sonoj estis la mallaŭtaj susurado de la ŝtala kafkruĉo kaj siblado de la kafo, kiu superbolis kaj gutis en la fajron sube.

Profesoro Ŝibolet rompis la silenton. “Tiu ĉi scenejo estas bone aranĝita, Sinapo. Sed vi faris unu kulpigan eraron.”

Kio estis la eraro? Se vi havas supozon, sendu nur unu solvon al redakcio (adresojn trovi en la kolofono) **antaŭ la 15-a de Februaro**. Inter la solvintoj ni lotumos \$5-rabaton de la retbutiko.

Why we need a strong national association

el la arĥivo • Cathy SCHULZE

In this issue our time machine lands in December of 1987, when the great Cathy SCHULZE penned this essay explaining the unique role a national Esperanto organization can play in promoting the language. While many things have changed since 1987, Cathy's arguments remain relevant. — Ed.

“Why should I join ELNA?” is a frequent question. I answer it thusly.

First, What is ELNA? Quite simply, ELNA is all of its members working together. Most of us were introduced to the International Language because of some activity of association members — a letter to the editor, article, TV, radio, or newspaper interview, or talk to a service club.

If we learned Esperanto on our own, we were probably advised on learning materials by someone in ELNA. If we attended a class, that class was possibly possible because of cooperation and encouragement between ELNA members. If ELNA works, it is because we are working.

We are often asked why Esperanto has not become more widely adopted. My answer: It is remarkable not only that Esperanto continues to prosper but that it is still around at all, given the official neglect and the grassroots nature of Esperanto's promotion from the earliest years.

Another frequent question, “How many people speak Esperanto?” or “How many Americans speak Esperanto?” We have no way of knowing the answer to either question because so many Esperanto-speakers are not members of any organization. (Similarly, we have no way of knowing how many people play bridge because relatively few join a national association.)

So, what good is ELNA? It's very difficult to persuade a legislator or an educator to become interested in Esperanto when a big country like ours can show less than one thousand members. For sheer prestige, we need a strong national association.

In short, ELNA represents us to the public; it provides the glue that keeps individuals and groups in touch, encourages common goals, initiates programs, and advises through its information services. And finally, those of us working to promote the use of Esperanto are really quite selfish — after all, the more people using Esperanto, the more value the International Language has for us.

I hope that you have written your 1988 check long before reaching this point. On behalf of the Executive Board of ELNA, I wish you a happy 1988 with many interesting friends added to your roster — a lot of them right here in ELNA!